

Rilatoj kun la aŭtoritatoj laŭ Hector Hodler

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 februaro 12 kaj 14

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo87-06/SRI-1987-06-A-3-12-17-feb-1987-Claude-kaj-Andree-GACOND-Rilatoj-kun-la-aŭtoritatoj-lau-Hector-Hodler.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Kiam oni intimiĝas kun la penso kaj agadsinteno de Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio, estas interese ekzameni lian manieron rilati kun la registaraj aŭtoritatoj, eminentuloj politikaj, sciencaj kaj eĉ propraj al la esperanto-movado. Koncerne tiun ĉi temon ni legos al vi kelkajn signifoplenajn erojn de artikoloj aperintaj en la revuo "Esperanto" inter 1911 kaj 1920.

A.- Kiam Hector Hodler fondis UEA-n en 1908, li sendis sian alvokon al tre vasta esperanto-publiko, en kiu troviĝis eminentaj kaj influaj personoj. Estas fakto, ke ne de la gravuloj venis la apogo, sed de la simpluloj. Tiu ĉi fakto tute certe firmigis Hector Hodler en sia konvinko, ke Esperanto nenion atendu de la eminentuloj, de la klopodoj ĉe parlamentanoj, registaroj kaj eĉ mondorganizaĵoj. Jen ni legas rilate al tiu ĉi temo tekstojn de Hector Hodler:

Cl.- "Ĝenerale, kiam grava organizaĵo fondiĝas, la iniciatantoj, antaŭ ol sin turni al la publiko, klopodas havigi al si la helpadon de kelkaj eminentaj influaj personoj, kaj kolektas pli malpli grandan kapitalon, kiu permesos fari la unuajn necesajn instalaĵojn kaj starigi la organizaĵon, ĝis komencos aliĝi la publiko. Ĉe la fondota UEA ni ne povis tiel agi, la tiamaj eminentaj personoj de la Esperanta movado estis okupataj pri lingvaj demandoj kaj bonvolis kompateme nin averti, ke nia ideo estas nerealegebla... Sen tiu apogo ni do devis komenci. Kiel kapitalon ni havis kelke da liberaj horoj kaj la pli-malpli grandan influon de tiu gazeto, cetere tiam en deficiton. En tiuj cirkonstancoj ni estis devigataj nin turni tuj al la Esperantista publiko... Se ni ne havis monkapitalon, ni almenaŭ havis - kio eble estas preferinda - la laborkapitalon de multaj sindonemaj Esperantistoj, kiuj tuj post nia alvoko respondis ĝin metante sian penadon al nia dispono... Dank'al ilia kunpenado, ilia materia kaj humila laboro, nia Asocio tiel rapide grandiĝis, malgraŭ la internaj organizaj malhelpoj, kiujn ni renkontis pro monmanko."

A.- Hector Hodler daŭrigas : "Laŭ mia humila opinio, kiun mi trudas al neniu, la Esperantistoj kiuj klopodas akiri ... malprecizajn aprobojn kaj promesojn de ne konvinkataj Parlamentanoj, simple perdas tempon, kiun ili povus pli utile dediĉi al pli interesaj agadoj. La Parlamentanoj vere interesiĝos pri Esperanto nur kiam Esperanto ne plu bezonos ilin !"

Cl.- "Nuntempe naciaj registaroj ne povas nin multe helpi. En multaj landoj lokaj registaroj (urbestroj, provincestroj) povas fari al ni utilajn servojn, Tamen, ĉio tio estas flankajo. **Ni** mem unue **laboru**. Kiam ni estos fortaj, la registaroj atentus nin. For de ni la kredo, ke per dekretoj la registaroj povus vivigi nian lingvon, se ni mem antaŭe ne sukcesis ĝin vivigi."

A.- "Kredo al tutpotenco de registaroj malkreskigas senton pri individua respondeco, dum pliboniĝo de la komuna vivo ĝuste dependas de ĝia kresko."

Cl.- "Ekzistas Esperantistoj, kiuj opinias, ke Esperanto estos venkinta, kiam per registara dekreto ĝi estos devige instruata en ĉiulandaj lernejoj. Ili konsideras la tutan problemon nur el tiu vidpunkto. Nu, tio tute ne sufiĉas. Se samtempe kun la instruado en la lernejoj, oni ne

aranĝas praktikajn servojn, per kiuj la lernintoj povos tuj utiligi la ĵus akiritan scion, oni atingos tre mizeran rezulton. En ĉiuj gimnazioj de la mondo oni nuntempe instruas la latinan lingvon. Praktike ĝi estas senutila, krom al la kleruloj sin okupantaj pri filologio, al la katolikaj pastroj kaj al la profesoroj de latina lingvo. Ĉar la lernintoj ne havas la okazon ĝin uzi, ili forgesas ĝin kelkan tempon post la eliro el la gimnazio... En la mezepoko la latina lingvo ne estis pli facila ol nun; tamen preskaŭ ĉiuj intelektuloj uzis ĝin, skribis en ĝi siajn verkojn, parolis ĝin. Nuntempe oni ĝin instruas al pli multaj homoj ol antaŭe, sed ĝi estas multe malpli utila. Tio montras, ke ne sufiĉas instrui lingvon en la lernejoj, por ke ĝi estu vivanta lingvo, praktike uzata."

A.- Fine estas interese aŭdi la vidpunkton de Hector Hodler koncerne la adopton de Esperanto fare de Ligo de la Nacioj. La artikolo, kiun ni parte citos, estis verkita en aprilo 1919, do antaŭ ol la Ligo fakte vere ekzistis. Ĝia praveco estas atestaĵo pri la realismo de la fondinto de UEA. Ni citas:

Cl.- "De la Ligo de la Nacioj la Esperantistoj esperas... ke ĝi frue rekonos la necesecon de komuna interkomprenilo kaj fine akceptos Esperanton kiel oficialan lingvon, el kio logike sekvos ĝia enkonduko en ĉiulandajn lernejojn. Al tiu rezultaĵo oni kompreneble devas celi, sed oni ne devas havi iluziojn pri la ebleco de rapida sukceso, kaj precipe oni ne devas forgesi la neprajn kondiĉojn por ĝin atingi.

A.- "La Ligo de la Nacioj estos tre verŝajne peza organismo, pure registara, ankoraŭ pli malfacile movebla, pli timema, pli "singardema" ol la, unuopaj naciaj registaroj. Ne sufiĉas sendi petskribon kaj fari kelkajn klopodojn por ke la gvidantaro de la Ligo, tuj konvinkita, akceptu Esperanton kiel oficialan lingvon. Bedaŭrinde la afero estas pli komplika.

Cl.- "Unue, oni ne devas forgesi, ke pro la specialaj kondiĉoj, en kiuj naskiĝas la Ligo, la partianoj de la Franca lingvo kaj tiuj de la Angla multe agitiĝas por ke unu el tiuj lingvoj estu elektata kiel oficiala. La Ligo verŝajne alprenos nek la unuan, nek la alian ekskluzive, sed eble ambaŭ. Ni tre bone scias, ke tio tute ne solvas la problemon pri praktikaj rilatoj inter ĉiuj popoloj, sed ĝi duonsolvas ĝin koncerne la interregistarajn rilatojn, kiuj ĉefe interesas la nunajn gvidantojn de la Ligo..."

A.- "Ni do ne pensu, ke ĉar... komisiono iam esploros la problemon, ni devas trankvile atendi verdikton; kontraŭe, ĝuste de nia agado dependas tiu verdikto. Ju pli forta estos la Esperantomovado, ju pli utila estos nia lingvo, des pli verŝajna kaj facila estos ĝia oficialigo.

Cl.- "Tio montras al ni la vojon sekvotan: Paralele kun la klopodoj, kiujn laŭ la cirkonstancoj ni povas fari ĉe la oficialaj rondoj por vigligi ilian atenton, ni devas energie labori por propagandi nian lingvon kaj plimultigi ĝiajn praktikajn aplikojn. Jen la kerno de la problemo. Klopodoj farataj en la nomo de movado, kiu ne havus jam profundajn radikojn en sufiĉe vasta homgrupo, estus senefikaj..."

A.- "Ni devas ĉion fari kvazaŭ la registaroj ne interesiĝus al ni; tio estas la plej bona rimedo por ke ili estu iam kun ni."

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Prelegis Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri Hector Hodler kaj la aŭtoritatoj. Ĝis reaŭdo !